

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 587 (10) OKTOBRO 1954



La Nederlanda Ĉefministro inter gvidantoj de nia Movado

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj Artikoloj :	paĝo
De Boulogne-sur-Mer al Bologna : <i>Hans Jakob</i>	253
Wanda Zamenhof : <i>Hans Jakob</i>	265
La Eksperimento Midlothian : <i>D. Kennedy</i>	271
Mauro Jókai : <i>Paŭlo Balkanyi</i>	273
39a Universala Kongreso :	
Parolado de Profesoro Lapenna	255
Fakaj Kunsidoj, Raportoj pri	259
Belartaj Konkursoj : Raporto de la sekretario	263
Debata Konkurso	264
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	267
Enigma Konkurso	276
Esperantista Vivo	268
Internacia Konkurso	279
Nia Forumo	277
Oficiala Informilo	280
Radio kaj Esperanto	272
Tra la Libraro	269
Tra la Monda Esperantista	266

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 587

Oktobro 1954



1905 — 1955

de Boulogne-sur-Mer

al Bologna.

LA 39a kongreso en Haarlem akceptis la inviton de Bologna en Italujo kiel lokon de la

jubilea Kongreso 1955

Sinjoro Zacconi, Delegito de UEA, kiu prezentis la inviton en Haarlem, konvinkige certigis ke ĉiuj—Aŭtoritatoj kaj Italaj Esperantistoj—faros sian plejebelon, por ke la manifestacio sukcesu kaj konfirmu ĉies atendon.

Duonjarcento estos pasinta de la tempo kiam kunvenis kortreme kelkcento da Esperantistoj en Bulonjo-ĉe-Mar. La Esperantista Grupo en tiu ĉi urbo, prezidata de Advokato Alfred Michaux, ne estis la unua grupo en Francujo, sed estis tre vigla kaj kalkulis inter si kelkajn fervoregajn membrojn, vokitajn por ludi rolon pli poste en la movado.

Relegante la dokumentojn pri tiu ĉi “*unua paŝo*” oni konstatas, ke regis ankoraŭ ia malcerteco pri formo kaj enhavo, ŝuldata al la foresto de sperto kaj rutino. Kun emocio oni legas ĉi tiujn esprimojn de firma kredo pri la bono de l’ideo. Kritikinto senanima eble estus parolinta pri “*aro da*

naivuloj, opiniantaj ke forigante la sekvon de la Babela turkonstruo oni kreos paradizon sur tero!” Sen tiu ĉi konvinko de ĉi tiuj pioniroj, la ideo de Lingvo Internacia ankoraŭ nun estus Utopio, rava revo, aŭ kampo de eksperimentado de lingvistoj kaj lingvofabrikantoj. Al ili, kiuj kunvenis en 1905 kaj por tiel diri metis la fundamentan ŝtonon de nuna fierakonstruaĵo, al ili ni ŝuldas senliman respekton kaj admiron.

La unua kongreso estis provo sukcesinta. Ĝi diskutis . . . pri kio do? Nu, pri organizo! Neniu el ili kiuj diskutis, konsciis tiam, ke tiu ĉi “organiza problemo” iros kiel ruĝa fadeno tra la sekvontaj kongresoj kaj devos fluigi multan inkon kaj kaŭzi penon kaj ĉagrenon.

Inter la pozitivaj atingiĝoj de l’ “UNUA” troviĝis la kreo de lingva aŭtoritato, la “Lingva Komitato” konsistanta el 98 anoj el 18 landoj. El ili estas ankoraŭ inter ni (sub rezervo, ke pri unu aŭ du personoj la verkinto ne posedas plej lastajn novaĵojn): Samideanoj Cejka (ĉeĥo); Bagnulo (italo); Nylén (svedo); Renard (sviso).

Plie estis starigita “Organiza Komitato” el kiu evoluigis la “K.K.K.”, kiu ne identas kun “klano” samlitera, sed “Konstanta Kongresa Komitato”, komisiita kunordigi kaj kontroli la elementojn de *ĉiujara kongreso*, principe akceptita en Bulonjo-ĉe-Mar.

Diskutita kaj akceptita estis la

Deklaracio pri Esperantismo

baza dokumento de la movado, kompletigo de alia baza dokumento lingva, nome la

Fundamento de Esperanto

Batalanta movado bezonas videblan signon, kaj la kongreso akceptis la formon de la kvinpinta verda stelo kaj la flagon.

Konstatebla estas el tio, ke la “UNUA” ne estis “babilanta” sed “laboranta” kongreso, feliĉa edziĝo de idealismo kun realismo.

Pri tiamaj aktivuloj, decas rememorigi en la jaro jubilea. Ja nur kelkaj el ĉi tiuj pilgrimintoj ankoraŭ vivas. La nunaj ilin certe akceptos kun ĝojo, se la jubilea kongreso ilin iamaniere honorigus, esperante ke ili aŭ kelkaj inter ili povos ĉeesti. Figuro elstara de la “UNUA” estis Generalo Hyppolite

Sebert, fondinto de la Centra Oficejo Esperantista en Parizo, gvidita dum jardeko de samideano Gabriel Chavet, pioniro kaj fondinto de la unua grupo esperantista franca en urbo Louhans, proksime de Mâcon. Aperis en Bulonjo interalie entuziasma junulo, kiun sorto destinis doni decidan direkton al la movado: Edmond Privat. Kvazaŭ por kuraĝigi la redaktorojn—16-18 jaraĝajn—de la periodaĵo “Juna Esperantisto”, nome H. Hodler kaj Edmond Privat, la “Organiza Komitato” decidis ke jaron poste okazu la “dua” en Genevo.

Bulonjo—Bolonjo . . . ambaŭ urboj iam havis saman nomon, Bononia. Bulonjo hodiaŭ ne povus gastigi la jubilean kongreson pro kaŭzoj konataj—sekvo de la dua milito. Bolonjo disponas je ĉiuj elementoj por sukcese organizi la 40an kongreson: granda urbo, universitato, taŭgaj lokoj por kunvenoj kaj ĉefe celkonsciaj Esperantistoj. Italujo ne nur klasika pro pejzaĝoj, lingvo kaj arto, estas klasika lando turisma pri kio ni ne bezonas eĉ perdi vorton. Tial

Ek al Bolonjo en 1955 !

Hans Jakob.

BIOGRAFIO DE TITO

La Esperanta eldono enhavas kvin ĉapitrojn ne troveblajn en nacilingvaj tradukoj

Aŭtoro: VLADIMIR DEDIJER

Tradukinto: MASON STUTTARD

518 paĝojn, plus 40 fotoilustraĵoj

prezo: bele bindita, 22ŝ. 6p., afr. 1ŝ.

Mendu ĉe Libroservo de U.E.A.

Parolado de Profesoro Lapenna dum la Inaŭgura Kunsido de la 39a Universala Kongreso

I

BALDAŭ eksonos la fina akordo de tiu ĉi inaŭgura simfonio, la plej kortuŝa, la plej impresa kaj la plej impona parto de ĉiu Universala Kongreso.

Ĉiam ripetigas la samo: centoj da batalantoj por la granda idealo, dissemataj larĝe tra la mondo, kun arda sopiro ĵetadas siajn rigardojn kaj projekcias siajn pensojn dum pluraj monatoj, kelkaj el ili eĉ dum multaj jaroj, al tiu ĉi unika momento de la nuntempo, al evento kiu ebligas en la estantecon travivi kaj persone sperti la estontecon. Ĉu mirige, ke ju pli alproksimiĝas la grandaj tagoj, des pli streĉaj fariĝas la sentoj, des pli intensaj la pensoj. Kiam, fine, alvenas la longe dezirata momento, kiam la homoj de pluraj rasoj kaj multaj nacioj, de diversaj politikaj konvinkoj, filozofiaj konceptoj kaj religiaj kredoj alparolas unu la alian en lingvo komune homa kaj al ĉiu same kara, tiam subite la nervoj malstreĉiĝas por lasi lokon en la tuta interno al jubila ĝojego pro la sukceso super la antaŭjuĝojn, pro la venko super la Babelon, pro la vera miraklo vidata, aŭdata kaj mem partoprenata. Ĉiu el ni havas tiun agrablan ebriigan senton en tiu ĉi solena horo: kaj tiu maljuna pioniro, kiu jam ofte travivis la samon, kaj tiu nova samlingvano, por kiu ĉi tie la unuan fojon malfermiĝas la fenestro al la mondo. En tia tute speciala etoso de entuziasmo ĝenerala kaj feliĉo komuna certe ne maltaŭgas ideoj tre altaj, esprimataj per vortoj elektitaj, sonoraj, poeziaj.

Oni pardonu al mi, se mi ne agos tiel, sed se mi turnos min pli al la cerbo ol al la koro, pli al la racio ol al la sentimentoj. Mi scias kaj konscias, ke ne estas ĉi tie la loko—nek cetere tio estas mia intenco—doni detalan analizon el sociologia, psikologia kaj eĉ politika vidpunktoj pri la nuna pozicio de Esperanto en la mondo. Tamen, unu solan, sed tre esencan punkton mi ne povas lasi netuŝita en tiu ĉi komenca stadio de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto.

II

La fundamento, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de la Esperantismo, estas la lingvo mem. Surbaze de la genia verko de D-ro Zamenhof kaj tute speciale surbaze de la profunde sciencaj principoj, kiujn li starigis, pri la vojo de evoluo de la Internacia Lingvo, en nuraj 67 jaroj ni sukcesis transformi projekton en vivantan, plene funkciantan lingvon, ĉiam pli perfektan, ĉiam pli nuancitan, sed samtempe ĉiam pli unuecan. Al tiu mirinda transformiĝo—neniam antaŭe spertita de la homaro—kontribuis la tuta esperantista kolektivo kaj en ĝia kadro ĉiu unuopa persono kiu parolis aŭ parolas Esperanton: de la plej elstaraj spiritoj kuraĝe ekverkintaj beletre aŭ science, traduke aŭ originale en la nova lingvo; de tiuj aŭdacaj gepatroj, kiuj ne hezitis enkonduki ĝin eĉ en la familian vivon, ĝis la plej senpretenda ordinara homo, kiu uzas ĝin en sia societo. kun siaj amikoj, dum sia eksterlanda vojaĝo aŭ en kiu ajn alia okazo. Ili kontribuis tial, ĉar nur dank' al ĉiufanka praktikado

de la lingvo en la plej larĝa senco de tiu ĉi vorto ĝi fariĝis nekontestebla socia fakto. Oni povas ne vidi tiun fakton, oni povas intence fermi la okulojn por ne vidi ĝin—kaj multaj miopaj homoj, bedaŭrinde ankaŭ sciencistoj agas precize tiel—sed tio ne povas ŝanĝi la realon: objektive, Esperanto hodiaŭa estas socia fakto. Se nenio alia, do nur tiu lingvistika sperto, unika en la tuta kultura historio de la homaro devus—pro pura scienca scivolemo, se ne pro aliaj kaŭzoj—interesigi ĉiun lingviston kaj ĉiun sociologon. Kaj se pro nenio alia, do nur pro tiu sola nia propra kreaĵo, ni devus senfine ami tiun nian infanon, patrinece ĝin flegi, plej energie ĝin protekti kaj ankaŭ fieri pri ĝi: multe pli ol oni kutimas tion fari.

III

La lingvoj en la vera senco de la vorto ordinare naskiĝas unue kiel parolataj kaj nur poste, en la longa daŭro de sia evoluo, ili transformiĝas ankaŭ al skribitaj, literaturaj lingvoj. La Internacia Lingvo povis transsalti tiun longegan evoluprocezon kaj, utiligante la kulturan heredaĵon de la plej riĉaj naciaj lingvoj, ĝi komencis sian vivon tuj kiel literatura lingvo. Doktoro Zamenhof bonege komprenis, ke lingvo sen propra literaturo ne povas havi kulturan valoron, nek ĝi povas ludi la rolon de ĝenerala instrumento de komunikado kaj de pensado en ĉiuj sferoj de la internacia vivo. La Esperanta literaturo, kiu hodiaŭ formas tre interesan, tre diverskoloran kaj belegan mozaikon de la spiritaj valoroj de ĉiuj popoloj, havas duoblan signifon por la lingvo. Unuflanke ĉiu nova traduko, ĉiu nova originala verko, ĉiu romano, novelo, poemo, eseo ankaŭ ĉiu scienca verko

aŭ disertacio signifas plian internan riĉigon de la lingvo kaj plian cementigon de ĝia kohereco. Aliflanke la literatura verkado plenigis kaj plenigas la lingvon per ĉiam pli ampleksa kaj altkvalita kultura enhavo. La rezulto estas, ke hodiaŭ, do post nuraj ses jardekoj, malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj kaj obstakloj al la kultura agado en monda skalo, Esperanto transformiĝis al kultura lingvo kaj fariĝis konsiderinda faktoro en la kulturaj internaciaj rilatoj.

Kial ni tion akcentas?

Tial, ĉar ekzistas ankoraŭ homoj, eĉ alte starantaj en la kultura hierarkio, kiuj kun supereca aroganteco karakteriza por ĉiuj ignorantoj senĝene kaj facilanime asertas, ke Esperanto ne estas kultura lingvo. Ili ne komprenas, ke ekzistas per si mem nek kulturaj nek nekulturaj lingvoj, sed ke la kultura karaktero de kiu ajn lingvo dependas ekskluzive de la kulturaj valoroj kreitaj en ĝi. Ili kantas odojn al siaj propraj naciaj lingvoj kaj ankoraŭ multe pli al tiuj de la grandaj popoloj kaj ili tute forgesas, ke tio, kion ni hodiaŭ prave admiras en tiuj lingvoj estis iam konsiderata kiel primitivaĵo. Ili romantike parolas pri la beleco de la popolaj lingvoj, sed forgesas ke ili mem devis ŝvite studi en la lernejoj sian propran literaturan nacian lingvon por liberiĝi de la akcentoj, esprimoj kaj formoj de tiuj tiel nomataj “popolaj lingvoj”, kaj cetere en la ordinara vivo ili tute malprave kun malŝato rilatas al ĉiuj, kiuj pro manko de studoj restis sur la nivelo de la popola lingvo! Ili nomas Esperanton barbara kreaĵo kaj kun fiero akcentas sian scion de unu-du fremdaj lingvoj, kaj en sia tromemfido ne rimarkas nek sentas la ofte tre barbaran aspekton de tiu fremda lingvo,

kiam ĝi estas parolata aŭ skribata de ili mem.

Sed ni lasu tion. Ĉiu laŭ sia gusto. Por ni gravas antaŭ ĉio la senduba fakto, ke Esperanto estas socia realaĵo kaj ke ĝi, krome, jam fariĝis kultura lingvo. Tio estas la nuna konstato.

IV

La dua tuŝota afero rilatas al la karaktero de la homa socia naturo en la aktualaj, nuntempaj kondiĉoj. Se ni ĵetas nur la plej supraĵan rigardon al la evoluo de la homaro, ni facile rimarkas, ke ĝia tuta historio esence konsistas en laŭgrada pasado de la plej simplaj kaj primitivaj, malgrandaj kaj mallarĝaj formoj de socia kunvivado al ĉiam pli ampleksaj teritorie kaj al ĉiam pli grandaj nombre sociaj unuoj. De la hordoj, triboj kaj gentoj ĝis la hodiaŭaj grandaj nacioj la vojo estis longa. Tre ofte ankaŭ sanga ! Sed la homaro necese atingis kaj ne povis ne atingi tiun ĉi stadion. La fundamenta karakterizo de la hodiaŭa historia epoko estas la ekzisto de la nacioj kaj, kompreneble, de la naciaj lingvoj. En kelkaj partoj de la mondo, ekzemple en Eŭropo kaj Ameriko, tiu procezo jam delonge finiĝis. En aliaj, ekzemple en Azio kaj Afriko la nacioj kaj naciaj lingvoj nun formiĝas.

Estus, tamen, granda eraro pensi, ke la nacio estas la sola formo, en kiu ni vivas. Ĉiu el ni sentas tre forte la apartenon ankaŭ al pli intima regiono, al tiu parteto de la terglobo, kiu nin naskis, kie ni unue ekpaŝis, kie ni eldiris balbute la unuajn vortojn. Kaj tiu aparteno estas eĉ pli sentimentala ol la aparteno al la nacio.

Fine, la plej klarvidaj spiritoj komprenas, aŭ almenaŭ intuecie sentas, ke per la formiĝo de la nacioj la vojo certe ne finiĝis. Ĉiam pli kaj

pli, en tiu aŭ alia formo, stariĝas la postuloj por kreo de ankoraŭ multe pli grandaj sociaj kaj politikaj unuoj, kiuj finfine kunfandiĝos en la unueca homaro.

Tiele, en la plej ĝeneralaj trajtoj la homa socia naturo montras hodiaŭ tri ĉefajn aspektojn, kiuj respondas al la tri fundamentaj kadroj de kunvivado : la regiono, la nacio, la homaro. Al la du unuaj aspektoj respondas du diversaj lingvoj : la loka dialekto kaj la nacia literatura lingvo. Al la tria aspekto povas respondi nur neŭtrala, supernacia, tuthoma lingvo. Kaj ju pli tiu tria aspekto—sekve de la normala evoluo de la homaro, kiu kun la ŝtala logikeco de la sociaj leĝoj iras al sia unueco—ju pli tiu tria aspekto manifestiĝos, des pli vaste la Internacia Lingvo estos uzata.

Tio estas la dua konstato.

V

Se la du konstatoj—tiu pri la karaktero de Esperanto kaj tiu pri la tri aspektoj de la homa socia naturo—estas ĝustaj—kaj mi estas certa, ke ili estas ĝustaj—tiam ili ne nur kun absoluta scienca certeco pravas la pravecon de nia starpunkto pri la rolo de la Internacia Lingvo en la estanteco kaj estonteco, ne nur plej evidente montras, ke nia tuta laboro troviĝas sur la linio de la ĝenerala homarevoluo, sed samtempe ili klare indikas kie kaj kiel ni devos agi en la estonteco.

Unuflanke ni devos multe pli larĝe disvolvi plej diversajn kulturajn aktivecojn ne nur en la sferoj de literaturo, de sciencoj, de revuoj kaj gazetaro, de radio, filmo kaj aliaj branĉoj de la kultura vivo, sed ankaŭ dediĉante multe pli da atento al la kultura laboro en ĉiuj niaj organizaĵoj

de la plej malgranda loka grupo ĝis la superaj organoj de la Movado. Riĉiĝante per ĉiam pli abunda kultura enhavo, la lingvo ne nur prezentos por ĉiu el ni multe pli signifan kulturan trezorujon, sed iom post iom ĝi ankaŭ fariĝos altira lumturo en la profunda krepusko, kiun eniris la malnoviĝinta kulturo, esprimita en pure naciaj formoj, mallumo, el kiu ĝi ne plu trovas eliron.

La dua, paralela, flanko de nia aktiveco devas direktiĝi al planita venkado de la publika opinio, tute speciale en tiuj medioj kiuj jam komencis senti tuthome. Ni ne forgesu, ke en veraj demokratioj la politiko, ankaŭ la kleriga politiko de la parlamentoj kaj registaroj, grandparte dependas de la publika opinio, de la premo kiun faras la amasoj rilate difinitan demandon. Ni ankaŭ ne forgesu, ke en ĉiuj internaciaj organizaĵoj la lastan vorton finfine havas la ŝtatoj kaj ke, sekve, de la publika opinio en ĉiu unuopa lando multrilate dependas la finaj decidoj de tiaj internaciaj organismoj. Tial vasta laboro, bone planita, science bazita por gajni la publikan opinionon, por venki la mitojn kaj superstiĉojn en la ŝlosilpozicioj de la kultura vivo ĝenerale, havas unuarangan signifon.

Mi kuraĝas aserti, ke, sen ia ajn rilato al la eventualaj oficialaj apogoj fare de gravaj instancoj, ni povas per niaj propraj fortoj, per niaj propraj rimedoj fari seriozajn paŝojn antaŭen en la sekvantaj jaroj. Necesas nur, krom la fortika kaj neŝanceliĝebla konvinko pri la fundamentaj valoroj de la Internacia Lingvo, ke ni ĉiurilate firmigu nian unuecon. Ne temas ĉi tie nur pri unueco organiza, kiun feliĉe jam delonge ni atingis, sed temas pri unueca konceptado de la fina celo, pri unueca baza programo

por atingi de tiu celo, pri unuecaj metodoj kaj vojoj en la realigo de la programo, pri unueca, komuna, efektiva kunlaborado. Nur tia unueco idea, strategia kaj taktika, donas realan sencon al la slogano "Unueco estas forto", nur tia unueco signifas absolutan garantion por la estonteco.

Ĝis nun ni luktis nur per la forto de la argumento, sed kontraŭ ni staris la argumento de la forto. Ni plifirmigu la argumenton, sed ni baldaŭ atingi ankaŭ la forton: forton de la unueco, forton de la nombro en niaj organizaĵoj, forton de vasta apogo ekster niaj vicoj. Kaj atinginte tion ni fiere flirtigu larĝe kaj alte, tre alte super la mondo tiun nian verdan standardon de la espero, la solan ne makulitan de homa sango, por ke ĉirkaŭ ĝi kolektiĝu ĉiuj fortoj, kiuj ne nur diras, sed profunde sentas, ke la homoj estas antaŭ ĉio homoj kaj ke la terglobo povas esti komforta, hela domo por ĉiuj raso, por ĉiuj nacioj, por ni ĉiuj. Nur rekte, kuraĝe kaj senkompromise antaŭen!

Dankon de la Prezidanto

Dum plurmonata restado en hospitalo mi havis la favoron—kvankam malforta post grava operacio en unu vertebro—ĝui la kunsenton kaj bonkorecon de tre multaj gesamideanoj, kiuj kuraĝigis min per salutoj en formo de leteroj, kartoj kaj ankaŭ desegnaĵoj. Mi nun deziras, reakirinte iom la fortojn, per nia revuo sincere kaj kore danki al vi ĉiuj pro via amika gesto. Kaj nun ni ĉiuj kune startu en bona kuraĝo por la nova laborsezono!

Via

E. Malmgren.

Fakaj Kunsidoj

okazintaj dum la 39a Universala Kongreso

Ni donas sube mallongajn raportojn pri la ĉefaj kunvenoj de la fakaj asocioj Esperantistaj. Pli detalaj raportoj troviĝas en la koncerna fakaj organoj.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Dufoje la geinstruistoj kunvenis dum la 39a Kongreso. En la unua kunveno ili priparolis la organizajn aferojn.

Speciale havis la atenton la nederlanda leĝo pri geinstruistaj seminarioj, en kiu la instruado de Esperanto estas permesata kaj pro tio ili sendis dankleteron al la tiurilata ministro, esprimante en ĝi la esperon, ke ankaŭ en la nederlandaj elementaj lernejoj Esperanto baldaŭ oficiale povos esti instruata.

Ankaŭ al UNESKO iris ilia intereso kaj ili esprimis la esperon, ke UNESKO faros sian eblon instigi la diversajn landojn al la instruado de Esperanto en la lernejoj.

En la tria loko ili sin turnis al junulara Ruĝa Kruco kun la forta deziro, ke la centra organizaĵo de tiu sin turnu al la diversaj landaj organizaĵoj por subteni la instruadon de Esperanto en la lernejoj, por ke jam nun kaj estontece la junularo havu la eblecon pli libere interŝanĝi spertojn kun aliaj landoj.

En Japanujo komenciĝis organizita laboro en Esperanto por infanoj. Ĝi estas subtenata de unu el la plej grandaj eldonejoj en Tokio. Nia blinda samideano, S-ro Torii el Kioto, donis kelkajn informojn kaj instigis la geinstruistojn de la tuta mondo ensendi infanrakontojn pri la propra lando kaj cetere pri kiu ajn temo. Ĉiu eldonota libro enhavos proksimume tricent paĝojn. Aperis jam la japanaj volumoj kaj en

februaro aperos la franca volumo, poste la angla.

En la dua kunveno la geinstruistoj priparolis la eksterlernejan laboron. Enkondukis tiun temon S-ro Williams el Denton, Britujo, kiu ĝojis pro la fakto, ke la nuntempa instruisto ne plu estas policano, kaj ke venis en la lernejojn iom pli da libereco. La lernejo nun pli similas grandan familion kaj pro tio kunvenas ekster la lerneja tempo diversaj pli kaj malpli grandaj grupoj, kiuj sub gvidado de la instruistoj ludas ŝakon kaj damojn, muzikas, studas kaj prezentas teatraĵojn, sportas, deklamas kaj eventuale ankaŭ studas Esperanton. Ĉi tiu lasta gvidas al internacia korespondado kaj eĉ al vojaĝoj al la eksterlando, kaj tio estas tre grava por la edukado de la infanoj. Tiuj kluboj ĝenerale kunvenas tuj post la devigaj lernejaj horoj.

Vigla diskuto sekvis tiun enkondukon. Ĉie en la mondo la geinstruistoj fakte agas same kaj en diversaj landoj oni uzas por tio ankaŭ la liberajn merkred- kaj sabatposttagmezojn. Ili aŭdis eĉ pri tutaj orkestroj, flutkluboj kaj prezentadoj de teatraĵoj ekster la lerneja tereno. Roterdamo kaj Antverpeno eĉ faras konkursojn en gimnastiko, kurado, pilkludado. En Antverpeno la urbestro finance subtenas tiujn aferojn. En aliaj lernejoj la lernantoj mem faras ilustritajn gazetojn, ofte en gruplaboro. Entute ni povas konstati, ke tiu eksterlerneja laboro faras agrablan interligon inter la lernantoj

kaj la geinstruistoj, kaj tio nepre devas gvidi al pli efika edukado.

Bedaŭrinde estas, ke mankas nuntempe internacia revuo kiel la konata *Internacia Pedagogia Revuo*, monata periodaĵo, kiu antaŭ la milito estis ege ŝatata. Ĝi ree povus aperi, se la anaro de la internacia organizo de ILEI multe pligrandiĝus. Por instruisto ja estas ege interese aŭdi pri la laboro kaj la rezultoj de eksterlandaj kolegoj. La adreso de la organizaĵo estas: F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Anglujo.

H. H. Suurmans.

Kristana Esperantista Ligo Internacia

La ĉefaj punktoj de la kunveno estis la raporto de la kvin komisionoj:

- (1) pri agado inter la kristana junularo ;
- (2) pri ĝenerala propagando ;
- (3) pri organizado de la organo *Dia Regno* ;
- (4) pri dokumentado kaj esploro ;
- (5) pri kontakto kun Esperantistaj organizoj kaj kun internaciaj protestantaj asocioj ne-esperantistaj.

Estis decidite presigi la organon ekde januaro 1955 en Nederlando.

La jarkunveno en 1955 okazos dum la KELI-kongreso ie en la suda parto de Francujo aŭ Germanujo. La nuna Estraro estas: S-ro Erik Carlén, Svedujo, *Prezidanto* ; S-ro D. de Boer, Nederlando, *sekretario* ; S-ro Ingvar Lagerström, Svedujo, *kasisto* ; membroj S-ro H. A. de Hoog, Nederlando, Ing. Paul Hübner, Germanujo, Prof. W. J. Downes, Anglujo kaj S-ino Anna Alamo-Sandgren, Svedujo. *Redaktoro* de la organo *Dia Regno* estas S-ro C. P. Brakké, Nederlando.

Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj

NIA bone vizitita kunveno, sub gvidado de ĉefestraranoj de Jong kaj Lok, aŭdis raporton pri la lastatempa agado. La daŭra, rapida kresko de la organizaĵo dum 1954 je 500 membroj (kio estas 40% de la antaŭa stato) kaj 4 novaj landaj societoj estas ĝojiga fakto. Dum ĵus okazinta nacia kongreso en Hispanujo fondiĝis en tiu lando la plej juna IFEF-societo.

Krome la kunveno pritraktis novan kongres-regularon kaj el ĝi ĉefe la punktojn pri la rajto partopreni ilin. Nepre limigo de profitebuloj-neesperantistoj estas postulita, dum al ĉiuj Esperantistoj la pordoj estas vaste malfermitaj. LKK de la proksima IFEF-kongreso en Zürich kore invitas interesulojn por kongreso en majo. Informoj baldaŭ aperos en la esp. gazetaro.

Por altigi la kulturan kaj fakan valorojn de la IFEF-kongresoj, en la ĉi-jara manifestacio okazis prelegoj pri la instruado al pli junaj fervojistoj. En ĉiuj landoj, el tiuj prelegtekstoj estas momente verkitaj resumoj por prezento al ŝtataj fervojaj direkcioj kaj fervojistaj sindikatoj. Du membroj de la Konstanta Rektorado pri la fakprelegoj, ĉeestantaj tiun-ĉi kongreson, difinis temon kaj gvidliniojn por la prelegoj dum la proksima IFEF-kongreso en Zürich.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio

Prezidis: D-ro Kempeneers (Belgujo).

(1) Estas menciite, ke en T.E.K.A. ĉiam estis akceptataj, kiel membroj, ne nur kuracistoj sed ankaŭ membroj de ĉiuj medicinrilatantaj profesioj: apotekistoj, bestkuracistoj, flegistoj,

k.t.p. Kiel aprobanto povas aliĝi ĉiu interesato. En tiuj kondiĉoj, ne ŝajnas utile ŝanĝi la nomon de T.E.K.A., kiu jam havas longan ekziston en la Esperanto-movado.

(2) La ĉeestantaj membroj decidis denove funkciigi la Asocion. Estos aranĝata, en Bologna, interkonsente kun LKK, faka kunsido dum kiu estos prezentataj diversaj prelegoj. Ankaŭ estos organizataj vizitoj al hospitaloj k.t.p.

(3) Delegitoj estas enoficigataj en la diversaj landoj. Ilia tasko estos interrilati kun profesianoj en sia lando, varbi ilin por la Asocio, sendi informojn pri la Asocio al la faka enlanda gazetaro, k.t.p.

(4) La ĉeestantoj ĝojis pro la apero de *Medicina Revuo*, eldonita en Japanujo. Estas decidite, apogi la revuon per varbado de abonantoj kaj havigo de taŭgaj artikoloj.

(5) La kotizo estos du dolaroj, aŭ samvaloro, inkluzive abonon al *Medicina Revuo*. Se regula apero de la revuo estos certigita, aranĝo kun U.E.A. estos antaŭvidata por enkasigo de kotizoj en la tuta mondo.

(6) La Estraro konsistas provizore el: *Prezidanto* Prof. D-ro G. Canuto (Parma, Italujo); *Vic-prezidantoj* D-ro R. Maes-Dubois (Bruxelles, Belgujo) kaj Prof. Hideo Yagi (Japanujo); *Sekretario* D-ro Jovanović (Jugoslavio); *Kasisto* D-ro P. Kempeneers, 106 rue Général Lotz, Bruxelles, Belgujo.

La Universala Ligo

Prezidis S-ino F. C. Isbrucker-Dirksen, vic-prezidanto, kiu speciale bonvenigis post longa malsano Prof. Privat, prezidanton de U.L.

La sekretaria jarraporto de S-ro Andreo Cseh montras plibonigon de la cirkonstancoj rilate la aperigon de la revuo *La Praktiko*. Ĝi nun multe pli regule aperas.

La raporto donas la tekston de la rezolucio favore al Esperanto akceptita de la Mondfederalista Kongreso en Kopenhago en aŭgusto 1953. Nova rezolucio estos proponita al la nunjara kongreso de tiu organizaĵo en septembro.

La financa jarraporto, detale aperinta en *La Praktiko*, estas akceptita.

En la estraro estas reelektita Prof. Privat kiel prezidanto kaj estas elektita S-ro Hendriksen (Nederlando) anstataŭ S-ro Ponti.

La reprezentantoj de Universala Ligo en Germanujo, Danlando, Svedlando, Irlando, kaj Britujo faris mallongajn raportojn pri la afero de la mondfederalismo en siaj landoj.

Post fino de la labora parto, Prof. Privat faris paroladon en kunligo kun la ŝanĝoj en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.

H A A R L E M

Kiuj vidis ĝin, trovos trafajn kaj karajn memorojn.

Kiuj NE vidis ĝin, ricevos impreson esti ĝin vidinta per legado de la libro


H A A R L E M

48 paĝoj, sur luksa papero, kun 22 grandaj klarfotoj, plus bela kovrilo.

Prezo, broŝ. 2ŝ. 3p., aŭ frankite.

Eldonis: De Toorts, Heemstede.

Havebla ĉe la libroservo de U.E.A.



Jarkunveno de Veterana Esperantista Klubo

Ĉeestis 27 personoj. Prezidis sinjoro Bünemann el Hamburgo.

Li bonvenigis la kunvenintojn kaj laŭdis ilian daŭran fidelecon al ideo, por kiu ili komencis batali antaŭ pli ol 40 jaroj. La fondinto de la Klubo, sinjoro M. Lewin el Dunstable, Anglujo, prezentis la raporton pri sia laboro; lia ĉefa tasko estis enlistigado de sin anoncintaj veteranoj. Interesa estis la statistiko. V.E.K. nombras 420 anojn (kun pli ol 40-jara Esperanto-laboro); inter ili estas 20 akademianoj, 60 virinoj kaj 90 jubileantoj (kiuj Esperantistiĝis antaŭ pli ol 50 jaroj). Laŭ landa membreco estas 110 en Germanujo, 80 en Britujo, 40 en Francujo. Sekvas Bulgarujo (27) Italujo (17) Norvegujo

(17) Aŭstrio (15) kaj Usono (15). Ŝajne Esperantistoj estas longvivuloj. Sinjoro Steiner el Vieno estis laŭdata pro la eldonado de la V.E.K.-adreslisto kaj pro publikigo de V.E.K.-sciigoj en sia ĵurnalo, kaj li estis elektita kiel ano de la estraro por la jaro sekvonta. Klubo fonditaj antaŭ 1914 ankaŭ estis petataj sin anonci por aniĝo.

Poste la dekano doktoro Maillard el Parizo alparolis la kunsidon; li rakontis pri lia komenca lernado de Esperanto en la jaro 1892.

Oni sendis gratulan telegramon al la dua dekano, sinjoro Nylén en Stokholmo, kiu ankaŭ Esperantistiĝis en 1892.



Belartaj Konkursoj 1954

Raporto de la Sekretario

LA ĉijaraj konkursoj laŭnombro kolektis iom malpli da verkoj ol la pasintjaraj, kio tamen ne signifas, ke la intereso ne estis kontentiga. Al la branĉo *Originala Poezio* alvenis 35 poemoj, al la branĉo *Traduka Poezio* 13 konkursaĵoj, la nombro de la verkoj en la branĉo *Originala Prozo* estis 26, por la drama branĉo alvenis 6 teatraĵoj. El la prozaĵoj du ne respondis al la formalaj postuloj kaj tiuj do ne estis juĝataj. Entute alvenis 80 verkoj, el kiuj la komisiono prijuĝis 78. La validaj konkursaĵoj dividiĝis inter aŭtoroj el 15 landoj:

	verkoj		verkoj
Anglujo	11	Italujo	5
Belgujo	3	Jugoslavujo	3
Bulgarujo	4	Meksikio	3
Ĉeĥoslovakujo	15	Nederlando	13
Danlando	5	Saarlando	4
Francujo	4	Svedujo	1
Germanujo	3	Usono	1
Hispanujo	3		

Sume: 15 landoj—78 konkursaĵoj.

La juĝa komisiono konsistis el la jenaj membroj: S-roj Roger Bernard (*Francujo*), Erling Anker Haugen (*Norvegujo*), Luis Hernandez (*Hispanujo*), akademianoj S. La Colla (*Italujo*), F. Szilágyi (*Svedujo*) kaj G. Waringhien (*Francujo*).

Premiitaj konkursaĵoj

Originala Poezio:

1a premio: *Antaŭ Spegulo*, de **S-ino Eli Urbanova** (Praha, Ĉeĥoslovakujo).

2a kaj 3a premioj: *Premsonĝo*, de **Claude Piron** (Namur, Belgujo) kaj *Frua mateno en Sarajevo*, de

Poul Thorsen (København, Danlando).

4a premio: *Fenestroj*, de **Poul Thorsen**.

5a kaj 6a premioj: *Aktorino konfesas*, de **S-ino Eva Suchardová** (Praha, Ĉeĥoslovakio) kaj *Bela Vetero, sinjoro*, de **F-ino W. M. Smit** (Amersfoort, Nederlando).

Tradukita poezio:

1a premio: *Leprulo* (H. H. Sedorff), trad. **Poul Thorsen**.

2a premio: *El Anĝelo de la Morto* (J. O. Wallin), trad. **F-ino Magda Carlsson** (Rönninge, Svedujo).

3a premio: *Kanto en la sango* (J. Prevert), trad. **Jean Delor** (Gaillard, Francujo).

Originala Prozo:

1a premio: *Um-Senna kaj Um-Sentin*, de **Jean Delor** (Francujo).

2a premio: *Fraŭlina pudoro similas al oro*, de **Gerald C. Jervis** (Redditch, Anglujo).

3a premio: *La heroo*, de **Marjorie Boulton** (Stoke-on-Trent, Anglujo).

4a premio: *La lasta tago*.

5a premio: *Idilia golfo*, ambaŭ de **Stepan Urban** (Praha, Ĉeĥoslovakio).

Originala dramo:

1a premio: *Korespondu*, de **Antoni Seemann** (Praha, Ĉeĥoslovakujo).

Pluajn premiojn la komisiono ne pridecidis, sed kun laŭdo distingis tri konkursaĵojn: *La spirito mokas*, kaj *Mi esperas*, de la premiita aŭtoro en tiu ĉi branĉo, kaj *Lisio*, de **F-ino Marjorie Boulton**.

Fino sur p. 279

Debata Konkurso

okazinta dum la 39a Kongreso en Haarlem

MERKREDON posttagmeze okazis, sub la prezido de Mag. S. Pragano, konkurso en debatado, kiu anstataŭis la oratoran konkurson por gejunuloj de antaŭaj jaroj. Ĝi celis doni okazon al la kandidatoj pruvi sian pensoviglecon en la plej taŭga maniero, kaj pruvi al eventualaj eksterstarantoj ke Esperanto povas esti uzata de diverslandanoj por debatoj improvizitaj. En aliaj—neesperantaj—internaciaj kongresoj malofte okazas, ke la partoprenantoj kuraĝas improvizi paroladojn—kaj eĉ debati!—se ili devas paroli en alia ol la gepatra lingvo.

La temo de la debato estis: “La rolo de la Internacia Lingvo por la spirita unueco de la homaro”, kun la aldono de du demandoj pritraktotaj: “Ĉu la diverseco de la lingvoj malhelpas la spiritan unuecon de la homaro?”, kaj “Ĉu la Internacia Lingvo forigas, kaj ĝis kiu grado, tiujn malhelpojn?”

Partoprenis 5 debatantoj, venintaj el 5 diversaj landoj; du fraŭlinoj (el Hispanujo kaj Belgujo) kaj 3 sinjoroj (el Jugoslavio, Germanujo kaj Britujo). La lasta estis blinda, tamen li vigle partoprenis la debatadon, kvankam li ne povis fari skribajn notojn pri la diraĵoj de siaj interparolantoj.

La diskutado estis tre vigla kaj la interŝanĝitaj pensoj valoraj kaj prezentitaj kun konvinko kaj temperamento.

La juĝa komitato, konsistanta el S-roj Pragano (Nederlando), Jung (Nederlando), Morariu (Svedujo) kaj Castel (Italujo), decidis transdoni la

unuan kaj duan premiojn al S-ro Svetomir Budimir el Beograd, kaj al F-ino H. de Ketelaere el Antverpeno. S-ro J. Wells el Evesham ricevis la trian premion.

S.P.

25a IKUE-Kongreso, Amsterdam

31 julio-5 aŭgusto 1954

Partoprenis ĉ. 150 el 8 diversaj landoj. La kongreso estis sub la honora prezidanteco de Monsinjoro J. P. Huibers, episkopo de Haarlem.

Sabate posttagmeze estis la solena malfermo. Inter la parolantoj estis la sekretario de la Nederlanda Katolika Sindikato. Specialajn salutojn sendis Lia Kardinala Moŝto D-ro Theodor Innitzer, ĉefepiskopo de Vieno. Dum la dimanĉa Diservo predikis pastro L. Thalmaier (Germanujo) pri la temo: “La universala karaktero de la S. Maria-kulto”. La prelegoj de sac. H. G. Wannemakers (Nederlando) kaj de D-ro F. de la Puente (Hispanujo) pritraktis la problemon, kiamaniere Esperanto povus enpenetri en la internaciajn katolikajn movadojn. Dum tre altnivela artvespero estis prezentitaj kantoj kaj la tragedio *Gysbreght van Aemstel*. Oficiala akcepto de la kongreso okazis en la urbdomo de Amsterdam.

Trelertearanĝitaj aŭtobusekskursoj estis al Alkmaar, al Hago kaj al aliaj lokoj. Saluttelegramoj estis senditaj i.a. al Lia Papa Moŝto Pio XII-a, kaj al Ŝia Moŝto la Reĝino de Nederlando. En 1956 la IKUE-kongreso okazos en Barcelona.

Wanda Zamenhof

Alvenis en Haarlem ĵaŭdon, 29.7.1954, telegramo de S-ino D-rino Wanda Zamenhof: "Plej koraj salutoj al la samideanaro kaj sukcesdeziroj al la Kongreso. Ĝi estu grava paŝo antaŭen al la venko de la pacideo. Wanda kaj Ludoviko Zamenhof."

Vendredon, 30.7.54, venis alia telegramo: "Doktorino Wanda Zamenhof mortakcidentis tridekan de julio. Pollanda Esperantasocio, Dratwer."

Tiel inter du telegramoj finiĝis dramo. Blinda sorto finis vivon de kuraĝa persono, edzino de D-ro Adam Zamenhof

filo de nia Majstro. filon Ludoviko, agrikul-

Miaj pensoj reiras la Ni legis pri la terura la detruo de tiu ĉi urbo ĉiufanke al la Centro de scias ion pri familio atingis nin informo, ke pro taga pano. Tiam helpo seninterrompan centoj da samideanoj ĉiu-Familion!

Dum Januaro 1940 de polaj intelektuloj kaj Inter ili aro da Esper-Adam Zamenhof. Tio Sinjorino Wanda. La



S-ino Zamenhof postlasas tura inĝeniero en Polujo. jaron 1939, Decembro. batalo ĉirkaŭ Varsovio, kaj alvenis demandoj UEA en Genève: "Ĉu vi Zamenhof?". Fine ĉiuj vivas, sed kun peno UEA organizis sisteman kaj regulan, financitan de landaj. Ni esperis savi la

okazis la ĝenerala arestigo "estingigo" sinsekva. antistoj kaj ankaŭ D-ro estis unua bato por dua estis la "malaperigo"

de la bofratinoj, Lidja kaj Sofja en jaro 1942. Nenia ebleco venigi Sinjorinon Zamenhof kaj filon al eksterlando, malgraŭ niaj klopodoj. La kondiĉoj fariĝis nekredeble teruraj kaj estas miraklo efektiva, ke ĉion eltenis la brava virino.

Ni renkontis ŝin en Bern 1947. Sola ŝia penso kiu ne forlasis ŝin: "Ĉu eble mia edzo tamen vivas?". Oficiala dokumento aŭ atesto pri morto ne ekzistas, do oni rajtis esperi. Nenia postsigno estis trovita; ĉio estis provita, enketo inter fuĝintoj al Sovjetunio, inter anoj de la Pola Armeo en Oriento, nenio. Sinjorino Zamenhof esperis ĉiam ankoraŭ.

Kial ni tion diras? Nur por montri tipan ekzempon de la centmiloj, ja milionoj da aliaj, homsortoj simile kruelaj kaj korŝirigaj. La ampleksan korespondadon kun la Familio Zamenhof (germanlingve, kaj adresita al "Onklo H. J." sen ia mencio de Esperanto) ni konservis por daŭra rememoro.

Sinjorino Zamenhof ne plu estas. Tri semajnojn antaŭ sia morto ŝi skribis al mi pro alia servo farita. Ĉesis bati nobla koro de heroeca virino.

La enterigo okazis en Varsovio, la trian de Aŭgusto. La ceremonion partoprenis Varsoviaj samideanoj kaj lastan adiaŭon eldiris I. Dratwer, sekretario de la Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Hans Jakob.



Tra la Mondo Esperantista



Brazilo

En la granda urbo São Paulo, kie troviĝas kvar Esperanto-klubo, okazis lastatempe konkurso por elekto de la Esperanto-Reĝino de Sanpaŭlo en 1954. Tiu konkurso vekas grandan entuziasmon inter la lokaj kluboj kaj diskonigas la ekziston de Esperanto inter la cetera publiko. Tagĵurnaloj plene raportis; unu ne nur publikigis plenajn informojn pri la konkurso, sed ankaŭ montris sep-centimetrajn fotojn de tiuj belaj konkursantoj kiuj je tiu stadio de la balotado okupis la kvar unuajn lokojn.

Ĉeĥoslovakujo

Bedaŭrinde estas neeble varbi novajn membrojn por UEA en tiu respubliko, ĉar pagoj al eksterlando estas malfacilegaj, sed intereso por nia afero estas tre vigla, kaj la Esperanto-Junularo estas vere aktiva. Tiu organizaĵo eldonas regulan monatan cirkuleron "Tagiĝo" 8-12 paĝan.

Ĉijare dum ferioj oni aranĝis proksime de Opava *Someran Esperanto-Tendaron* apud rivero Moravice. Estis 3 etapoj po 14 tagoj kaj partoprenis entute 70 gesamideanoj. La nivelo estis vere alta.

Italujo

Pli ol kvarcent italaj Esperantistoj kunvenis la 29an kaj 30an de Majo ĉe Marina di Massa, okaze de la unua interregiona kunveno organizita de la Esperanto-Grupo de Massa. Parto-


prenis la prezidanto de I.E.F., D-ro Canuto, kaj ankaŭ ĉeestis la Prefekto, la Provincestro, du urbestroj, la Policestro, la Prezidanto de lokaj lernejoj kaj aliaj simile gravaj funkcianoj lernejoj, kulturaj kaj turismaj. La Urbestro de Massa bonvolis saluti la Esperantistojn promesante sian helpon por nia movado kaj monon por aĉeti Esperantajn librojn destinitaj al la Urba Biblioteko.

La Esperantogrupo en Massa, dum la koncerto, registris strion, kiun ĝi pruntedonos al ĉiuj eksterlandaj grupoj kiuj petos ĝin, je pago de la sendelspezoj kaj la luo.

Japanujo

La 41a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Tokio la 5an kaj 6an de Septembro 1954, en la aŭlo de Kyōiku Kaikan, kun la partopreno de ĉ. 300 Esperantistoj. La Kongreson prezidis Prof. D-ro H. Oka.

En la laborkunsido oni interalie decidis okazigi en Tokio post du jaroj Jubilean (50-jaran) Kongreson de la Japana Esperanto-Movado, en kiu oni atendas partoprenon de eksterlandaj samideanoj. Ĉe la sama kunsido oni raportis pri aferoj koncernantaj UEA en Japanujo kaj legis la Kongresan Rezolucion de la 39a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem. Plie la Esperantistoj en tiu unusola lando suferinta la teruraĵon de atombomboj aprobis rezolucion por la malpermeso de tiaj malhumanaj armiloj.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Konferenco de UNESKO en Montevideo

La Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazos en Montevideo de la 12-a de Novembro ĝis minimume la 11-a de Decembro 1954. En la tagordo de la Konferenco, sekcio III de la Dokumento de UNESKO 8C/I de la 15-a de Majo 1954, troviĝas la punkto 8.4.4.1 "Internacia Peticio favore al Esperanto". Ĝi estas la unua punkto de la branĉo "Kulturaj aktivecoj".

Kiel konate, okaze de la Konferenco en Montevideo, speciala Komitato aranĝas la grandan Universalan Ekspozicion de Esperanto. Laŭ la ĵus ricevitaj informoj, la preparlaboroj por la Ekspozicio estas sukcese plenumitaj kaj la Ekspozicio estos malfermita, samtempe kun la komenciĝo de la UNESKO-Konferenco, per solenaĵo, kiun ĉeestos elstaraj personoj de la kultura vivo de Montevideo. Al la Ekspozicio estos invititaj ĉiuj delegitoj ĉe la UNESKO-Konferenco.

Speciala dokumento de CED sub la titolo "Kontribuo de Esperanto al la Celoj de UNESKO" estos disdonita al ĉiuj delegitoj de la Konferenco kaj ankaŭ al la ĵurnalistoj, kiuj vizitos la Ekspozicion. La dokumento estas eldonita en la laborlingvoj de UNESKO, nome en la angla, hispana kaj franca.

En la tutmonda gazetaro jam aperis pluraj centoj da artikoloj kaj informoj pri la Internacia Peticio favore al Esperanto kaj pri la fakto, ke la Ĝenerala Konferenco de UNESKO pritraktos dum sia Montevidea Sesio

la demandon. Tre verŝajne en la sekvantaj semajnoj aperos pliaj artikoloj pri la sama temo. Ĉiuj esperantistoj, kiuj en iu ajn gazeto aŭ revuo rimarkis aŭ rimarkos artikolon aŭ informon pri la afero, estas petataj eltranĉi ĝin, noti sur la eltranĉaĵo mem la nomon de la gazeto kaj la daton, kaj sendi tion la saman tagon aerpoŝte al la adreso S-ro Rodolfo Garcia, Calle Yaguarôn 1397, Montevideo, Urugvajo. En la ekspoziciejo estos speciala spaco, sur kiu oni ekspozicios ĉiujn artikolojn kaj informojn, kiuj rilatas al la afero de la Internacia Lingvo antaŭ UNESKO. Ne necesas diri, ke ju pli da tiaj artikoloj troviĝos tie, des pli impona estos la impreso.

Pri ĉiuj detaloj koncerne la pritrakton de la Peticio fare de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, la kunlaborantoj de CED estas precize informitaj. En la Februara numero de "*Esperanto*" aperos analiza artikolo kaj originala teksto de la decido aŭ decidoj, kiujn faros la Ĝenerala Konferenco en tiu ĉi afero.

GRAVA ATENTIGO

La Honorofica Direktoro de CED, Prof. Ivo Lapenna, forveturos al Montevideo por ĉeesti kiel observanto de UEA la Ĝeneralan Konferencon de UNESKO, la 13-an de Oktobro. Li revenos al Londono nur la 6-an de Januaro 1955. Inter la 1-a de Novembro kaj la 17-a de Decembro lia adreso estos : *Prof. Ivo Lapenna*,

Fino sur p. 279

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Magnusson. Al S-ro Olafur S. Magnússon kaj S-ino Gerda Magnússon-Leussink, Hamrahlíd 9, Reykjavík, Islando, naskiĝis la 15an de julio 1954 filino, Margrét Sólveig.

Geedziĝo

Le Goff-Vincent. La 19an de aŭgusto 1954 geedziĝis S-ro Yves Le Goff kaj F-ino Jeannine Vincent, samideanino el Les Andelys, Francujo.

Vertillo-Brancatelli. La 4an de septembro 1954 geedziĝis S-ro Domenico Vertillo kaj F-ino Alfia Brancatelli, membroj en Tripolio.

Datrevenoj

Klajić. Serba pioniro de Esperanto, Delegito de UEA ekde 1910 en diversaj lokoj serbaj, S-ro Radomir Klajić, antaŭa Komitatano kaj ĉefdelegito, nun Honora Membro de UEA, atingis 80 jarojn dum aŭgusto ĉijara. La tuta familio de la jubileulo estas esperantista.



Radomir Klajić

Szymanowski, S-ino Elsbeth, en Luckenwalde, Germanujo (orienta zono), estinta Delegito de UEA, vidvino de fervora UEA-ano, festis 80-an datrevenon, 15.8.54.

Al ĉiuj, nian koran gratulon !

Niaj Mortintoj


Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, kaj deziras al iliaj parencoj esprimi nian plej koran kondolencon.

Dodge. Sinjoro Ernest G. Dodge mortis la 28an de aŭgusto en Washington, Usono. Li havis 84 jarojn, sed malgraŭ granda aĝo estis inter la plej viglaj samideanoj en Usono ĝis la momento de lia morto. Lerta kaj klera lingvisto, li lernis Esperanton antaŭ 45 jaroj, kaj verkis en Esperanto kaj angla lingvo. Esperantistoj en Usono kaj tra la tuta mondo sentos lian foreston.

Wittenberg. La 14an de julio mortis en Zürich, Svislando, S-ro Michael Wittenberg, je aĝo 73. Naskita en Ruslando, li loĝis tie, en Berlino kaj en Parizo; en 1942 li iris al Svislando. Li estis 30 jarojn aktiva kaj fervora Esperantisto, kies foresto malĝojigos tre multajn samideanojn.



S-ro René Llech-Walter, D. de UEA en Perpignan, ricevas florbukedon de ĉarma hispana fraŭlino post parolado en Tarrasa



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***Plena Vortaro de Esperanto**, kvara eldono, kompilita de Prof. E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, Prof. G. Waringhien, kun **Suplemento** kompilita de Prof. Waringhien. 576 paĝoj, 14×10 cm. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. Prezo 22ŝ., afranko 6p.

Ĉar pro diversaj malhelpoj la eldonistoj ne povas nuntempe efektivigi la longe projektitan produkton de *Plena Ilustrita Vortaro*, kaj ĉar jam elvendiĝis la lasta represita eldono de *Plena Vortaro* mem, estas decidite denove represi la verkon fotografe, sed samtempe aldoni Suplementon kiu pliigos ĝian utilon al la Esperantista mondo. Tamen por malpliigi la koston, la eldonistoj plue decidis draste redukti la formaton de la volumo, kaj sekve la literoj estas tre malgrandaj. Sed la papero estas bona kaj ankaŭ tre maldika, kaj la literoj estas klaraj en si mem ; la rezulto estas malpeza kaj alloga volumeto, kiu sendube plaĉos al la uzantoj ĝenerale.

La sekvantaj komentoj rilatas ne al la tuta verko, sed nur al la Suplemento, kiu aldonas ĉirkaŭ 60 paĝojn al la pli ol 500 de la antaŭa eldono de *P.V.* Kompilis ĝin Prof. G. Waringhien, kies nomo estas garantio de efika, sindona kaj konscienca laboro en la tasko kiun li akceptis. En interesa kaj informa Antaŭparolo li klarigas la principojn laŭ kiuj li

faris sian laboron, kaj citas la nomojn de specialistoj kaj diversaj aliaj personoj de kiuj li ricevis helpon, kune kun titoloj de fakaj terminaroj k.c., kiujn li konsultis. La Suplemento enhavas vortojn senintence ellasitajn el antaŭaj eldonoj de *P.V.*, kaj pli modernajn vortojn diversspecajn, inter kiuj troviĝas multaj teknikaj kaj sciencaj terminoj. Plue, reaperas vortoj kiuj jam aperis en *P.V.*, sed kiuj bezonis aliigojn en la difinoj aŭ aldonajn rimarkojn. Kompreneble ĉe aliaj vortoj la kompilinto sekvis, kiam dezirinde, la antaŭan modelon rilate al cito de utilaj ekzemplaj frazoj k.c., klarigaj pri la difinoj.

Sen komento pri noveco aŭ malnoveco, estu citataj, kiel ekzemploj, la jenaj vortoj, teknikaj kaj alispecaj, hazarde elprenitaj el la Suplemento : *buldozo, celofano, ciklotrono, dizelo, elektrono, endokrino, etoso, fotostato, hangaro, hormono, kamuflilo, koktelo, nilono, plasto, roboto, slogano, specio, streptomicino, tajpi, taksio, vitamino, volovano*. Tiaj vortoj estas apenaŭ diskutindaj, sed ankaŭ aperas diversaj vortoj pri kies bezonateco aŭ dezirindeco oni jam disputis kaj kredeble ankoraŭ disputos (inter ili eĉ certaj formoj uzitaj de Zamenhof mem) ; kaj plue, iuj vortoj uzitaj precipe de Esperantistaj poetoj. Ĉi tiuj lastaj aperas pro kialo klarigita en la Antaŭparolo. Kompreneble pri ĉiaj diskuteblaj formoj respondecas neniel

la kompilinto, sed la verkistoj ilin enkondukintaj (kaj neniu malŝatanto estas devigata ilin uzi).

Kritiko eble aŭdiĝos kontraŭ la apero de formoj esprimantaj certajn grekajn literojn (*alfa, beta* k.a.) kiuj, kvankam utilaj kaj eĉ bezonaj en diversaj teknikaj aferoj, ne estas Esperantaj substantivoj, ĉar ili ne finiĝas per *o*. Eble en estontaj eldonoj estus bone montri tiajn formojn en aparta listo, por eviti ian impreson ke povas ekzisti esceptoj al la fundamentaj reguloj de Esperanto.

Pluaj interesaj punktoj estu lasataj por diskuto al spertaj uzantoj de la Suplemento. La verko ja estas bonvena, kaj estos utila en pli ol unu maniero al la Esperantistaro. Prof. Waringhien kaj liaj specialistaj helpantoj plenumis altvaloran servon, kaj meritas plej koran kaj sinceran dankon.

Bernard Long.

(Por legantoj kiuj jam posedas *P.V.* estas utile menci, ke la *Suplemento estas havebla sola, kaj samformata kun la malnova eldono. La prezo estas 8ŝ. (afr. 3p.).)

Mia amiko—Tia estas mia amiko—Du etaj falditaj folioj plaĉe presitaj kun citaĵoj el la Biblio. Senpage haveblaj ĉe Kristana Esperanto Ligo, Gjutaregatan 19, Örebro, Svedlando.

Antverpeno. Nova tut-esperanta prospekto, 8-paĝa kaj 5-fota. Havebla ĉe Propaganda kaj turisma servo, Pelikaanstraat 6, Antwerpen, Belgujo.

Nancy. 8-paĝa informa prospekto senpage havebla ĉe Turisma Servo, 57 Rue St. Jean, Nancy, Francujo.

Germanujo. Belega 12-paĝa kajero en Esperanto. Formato 20 x 21 cm. Ĝi enhavas 6-paĝan ilustritan landkarton kaj aliajn bildojn de la lando kaj de ĝia vojaĝ-faciligadoj. Akirebla ĉe la Germana Federacia Fervojo.

Bonn. Belaspekta 24-paĝa ilustrita kajero en tri lingvoj kun 4-paĝa Esperanta aldono. Formato 20 x 21 cm. Senpage havebla ĉe Städtisches Verkehrsamt, Poststrasse 27-29, Bonn, Germanujo.

Stuttgart. 4-paĝa, 8-fota Esperanta faldfolio havebla ĉe Verkehrs- und Wirtschaftsförderungsamt der Stadt Stuttgart, Germanujo.

Bologna. 12-paĝa ilustrita tut-esperanta kajero de la 1955-Kongresurbo kun mapo de la urba centro. Formato 22 x 22 cm. Havebla ĉe Ufficio Propaganda dell' Ente Provinciale per il Turismo di Bologna, Italujo.

Padova. 6-paĝa faldfolio pri la 32a Internacia Foiro de Padova kun bildoj. Havebla de Foiro de Padova, Via N. Tommaseo 59, Padova, Italujo.

Novi Sad. 8-paĝa faldfolio kun multaj bildoj. Eldonita en Esperanto.

Skandinavujo. 6-paĝa faldfolio pri Danlando, Norvegujo, Svedujo kaj Finnlando. Eldonita en Esperanto kaj havebla ĉe Det Forenede Dampskibs-Selskab A/S, København, Danujo.

Steiermark (Stirio). Lukseldona 20-paĝa prospekto kun mallongaj bildoklarigoj en la germana, angla, franca kaj itala lingvoj, sed kun detalaj klarigoj presitaj sur aparta folio en Esperanto. Formato 22 x 20, kun 30 fotobildoj; havebla ĉe Landesfremdenverkehrsamt, Kärntnerring 15, Wien I, Aŭstrujo.

Gvidfolio tra la urbo Salvador. 4-paĝa *tutesperanta* broŝuro havebla ĉe Diretoria do Arquivo Publico, Divulgação e Estatística, Rua Visc. Rio Branco 18—2. andar, Salvador (Bahia), Brazilo.

Bonn. Tre luksa 24-paĝa kajero 21 x 20 kun pli ol 50 allogaj ilustraĵoj (precipe fotoj) kaj kunteksto verkita germane, angle kaj france. Estas aldonita folio kun plena traduko en Esperanto, nederlanda, sveda kaj hispana lingvoj. Städt. Verkehrsamt, (22c) Bonn, Germanujo.

Konsiloj al mendantoj de turismaj broŝuroj

Ne tedu la oficialajn informoficejojn per tro longaj leteroj: estu konciza.

Ne petu intervenon ĉe privataj entreprenoj, ekz. hoteloj.

Ne skribu al tiuj instancoj pri viaj privataj aŭ familiaj malagrablaĵoj.

Sed

Petu persone, multope—tamen ne grandan kvanton! La suprajn konsilojn sekve de spertoj ĉe tradukoj en informejo.

J.T.

D. Kennedy :

La Eksperimento Midlothian

LA EDUKADA KOMITATO de Midlothian, en Skotlando, ĵus komencis interesan kaj gravan eksperimenton pri lingvo-lernado. Antaŭ kelkaj jaroj, en Anglujo, oni publikigis raporton, kiu pretendis ke la lernado de Esperanto estas bona bazo por la lernado de la franca lingvo, kaj ke multaj infanoj kiuj jam antaŭe lernis Esperanton, pli bone sukcesis en la lernado de la franca lingvo ol aliaj infanoj, kiuj ne havis antaŭan instruon pri Esperanto. Ĉar la koncerna angla raporto baziĝis sur rezultoj gajnitaj en nur unu lernejo, la Edukada Aŭtoritato de Midlothian starigis eksperimenton en siaj lernejoj sur pli larĝa kaj pli severe kontrolata bazo, por eltrovi ĉu la pretendoj de Esperanto kiel helpilo por la lernado de la franca lingvo estas vere pravigeblaj.


La eksperimento komenciĝis antaŭ unu jaro, en 1953, kaj progresos laŭ tri stadioj. Dum la unua stadio, proksimume 20 spertaj geinstruistoj proponis sin kiel lernantojn de la lingvo, kun la celo poste instrui ĝin al infanoj en la plej altaj klasoj de la koncernaj elementaj lernejoj. Tiu kurso por la instruistoj daŭris de septembro 1953 ĝis marto 1954. Dum tiu periodo la instruistoj, dufoje en ĉiu semajno, kaj en unuhoraj periodoj, ricevis instruon de sperta Esperantisto. Je la fino de tiu kurso la geinstruistoj estis pretaj partopreni la duan stadion de la eksperimento, t.e. la instruadon de la infanoj.

La koncernaj infanoj, kun aĝoj 11-12, apartenas al la "A" fluo en la lernejoj, tio estas, al la pli lerta grupo. Ĝis junio 1954 ili vizitis naŭ diversajn

elementajn lernejojn, kaj en septembro translokiĝos al diversaj "Grammar schools" (gimnazioj kun kvin- aŭ ses-jaraj kursoj). Dum du monatoj, mezaprilo ĝis mezjunio, la jam preparitaj geinstruistoj instruis Esperanton al tiuj geknaboj. La lecionoj okazis dum du periodoj ĉiutage, entute dum 70 horoj. Por kontroli la progreson de tiu instruado, la Edukada Aŭtoritato invitis Britan Esperantistan Asocion sendi reprezentanton por viziti kelkajn el la lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton, kaj ankaŭ petis ke B.E.A. aranĝu komunan ekzamenon por ĉiu infano, je la fino de la instruado, por eltrovi ĉu Esperanto-bazo por la eksperimento vere ekzistas. Do, la reprezentanto de B.E.A., je afabla invito de la Direktoro de Edukado, vizitis ses el la lernejoj, alparolis la infanojn, faris demandojn al ili en Esperanto, k.t.p., kun kontentigaj rezultoj. Poste, en junio, okazis la ekzameno, kaj du B.E.A. reprezentantoj kontrolis la rezultojn. Ili trovis, ke en ĉiuj grupoj ekzistas adekvata Esperanto-bazo por la estonta daŭrigo de la eksperimento. La intensiva kurso estis necesa pro la cirkonstancoj, ĉar alia periodo dum la sezono ne estis disponebla por la instruado de Esperanto.

Nun, ek de septembro 1954, komenciĝos la tria stadio, dum kiu tiuj 180 esperantistaj infanoj, kune kun proksimume 180 neesperantistaj infanoj, samaĝaj kaj egale lertaj, troviĝos en diversaj "Grammar schools", por daŭrigi sian edukadon. Dum la sekvontaj tri jaroj ili ĉiuj

Fino sur p. 275.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.10–22.20	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV., Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 27-X, 24-XI). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Amerika Radio. En la pasintaj numeroj ni informis la legantaron pri aŭskultebleco de la diversaj eŭropaj stacioj. Ĉi tiuj programoj praktike ne estas kapteblaj ekster eŭropaj kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj, kun escepto de speciale direktitaj elsendoj.

Same la programoj el Urugvajo, Gvatemalo kaj Brazilo ŝajne ne atingas eksteramerikajn landojn, eĉ per mallongaj ondoj. Tamen ni ĝis nun ne ricevis precizajn informojn pri tio, kaj ĝojus raporti pri la sendopovo de ĉi tiuj stacioj.

Radio Roma. 1-X, Personaj impresoj pri mia vojaĝo al Nederlando ; 6-X, Instruistoj kaj lernantoj en la antikva Pompei ; 8-X, Rideto abundas . . . sur la lipoj de la saĝuloj (2a premio pri originala prozo en la 15a Hispana Kongreso en Zaragoza) ; 13-X, Riveroj, lagoj kaj plaĝoj de Italujo ; 15-X, La Sinjorino de la Lampo : Florence Nightingale—okaze de la unua centjarfesto de la Ruĝa Kruco ; 20-X, Vagante tra la stratoj de Romo ; 22-X, "Esperanta Ligilo", universala gazeto por geblinduloj—okaze de ĝia 50a datreveno ; 27-X, Marguerite Santreuil kantas ; 29-X, Leterkesto kaj bibliografio.

Paŭlo Balkányi :

Măuro Jókai

LA Hungara popolo solene memoris sian grandan verkiston okaze de la 50a datreveno de lia morto, 5an de majo 1904. Sed lia nomo estas konata en la tuta mondo, kaj la fremdlingvaj tradukoj el liaj verkoj superas ducent. Oni rajtas diri, ke li fariĝis populara ĉe ĉiuj, kiuj legis ion el lia plumo. Eble ne estas eŭropa lando, kie oni ne konus la “Oran homon” kaj la “Filojn de la ŝtonkora homo”. Sed ankaŭ ekster-eŭrope ne mankas liaj verkoj. Kelkajn novelojn oni aperigis jam en Esperanto en diversaj revuoj. Strange estas, ke ia grava verko ankoraŭ ne trovis tradukanton kaj eldonanton. Laŭ mia scio antaŭ la unua mondmilito konata hungara esperantisto tradukis lian romanon “La nova bienmastro”, kaj eĉ aperis abonalvoka cirkulero por la libro. Sed li mortis en la mondmilito kaj la manuskripto perdiĝis.

Malgraŭ multaj ŝanĝoj en la vivo de la nacioj, en la regadsistemoj kaj mondopinioj, vivformoj kaj ideoj, Jókai restas en Hungarlando unu el la plej multe legataj verkistoj.

Kio estas la senmorta valoro en lia verkaro? Kio katenis jam antaŭ cent jaroj la tiutempe ĉefe nobelan hungaran legantaron kaj antaŭ kvindek jaroj la ĉefe burĝan publikon, sed de tiu tempo la ĉiam pli legavidan popolan tavolon, la laboristaron kaj vilaĝanaron? Ĉu la realismo en liaj verkoj?

Vere estas multaj realistaj trajtoj en ili. Sed li estis ĉefe romantika verkisto. Liaj figuroj estas ofte tre esceptaj, ankaŭ la situacioj, en kiuj ili vivas. Li ofte tropentras la

realan vivon, la kontraŭdiroj kaj turniĝoj estas akraj, la neatenditeco kaj la neverŝajneco estas ankaŭ karakterizaj trajtoj en liaj verkoj. Sed li estis progresema romantikulo, kies ideoj, zorgoj estis la samaj kun la ideoj kaj zorgoj de la homaro, kiu volas ne deturniĝi de la realeco, sed li povas konscie alproksimigi la realecon per la rimedoj de la romantiko. Malofte li pentras homojn, kiuj ekzistas en tia formo, sed li tre okulvide pentras tiujn idealistajn homojn, kiuj enhavas la plej bonajn kvalitojn de la homaro kaj per siaj literaturaj vivoj entuziasmigas nin, ke ni klopodu esti—kiom tio eblas—similaj al ili. Kaj same draste li karakterizas kaj brue stampas la bildon de la peko. Li pligrandigas la bonon kaj ankaŭ la malbonon. Tra la lupeo estas ĉio pli bone videbla, eĉ se ni scias, ke la lupeo ĉiam iom misformas. Laŭ nunaj kritikistoj la realista priskribo estas pli evolua, pli altranga, sed ĝi ne faras ne necesa la romantikon. La triumfo de Jókai super la tempo pruvas la pravecon de la romantiko progresema laŭ la specimeno de Jókai.

Mallonge pri la ĉefaj edukaj idealoj de Jókai: la amo por la patrolando, kiu estas nedisigebla de la progreso, de la altenlevigo kaj liberigo de la patrujo kaj de la popolo. La alia hungara famulo, la granda poeto Petöfi,—eble eĉ pli multe konata tra la mondo ol Jókai—estis lia amiko kaj revolucia kunlaboranto. Ilikunegvidis la hungaran junularon en la jaro 1848 por triumfigi la sendependecon, la liberecon kaj la homajn rajtojn de la hungara popolo. Unu el la plej

unuaj agoj estis la 15an de marto 1848, la tagon de la hungara libereco, kion li faris kun siaj amikoj: la liberigo de la preso el la manoj de la cenzuro.

Li pripentras la gajan kaj gloran, sed plej ofte malgajan kaj ne gloran, historion de la hungara popolo kun ĉiuj kunvivantaj popoloj kaj lia patrujamo samtempe estas nobla estimo de la aliaj nacioj, el kiuj li ofte prenas tre simpatiajn sekvindajn figurojn. Sed al lia patrujamo forte ligiĝas la amo al la homaro. Li ofte skribis romanojn pri historioj el diversaj partoj de la mondo. La liberec-herooj de la mondo marŝas antaŭ niaj okuloj, de la dekabristoj de la frutempa rusa revolucio ĝis la liberec-batalantoj de Sudameriko. Li neniam estis ŝovinisto. Kaj estas nepre mencienda lia granda pacamo. Li skribis ardan alvokon al la pacmovado tiutempa. Lin multe interesis la demando de internacia lingvo, kvankam tiutempe en Hungarlando li ankoraŭ ne povis ion ekscii pri Esperanto.* Sed en novelo el jaro 1859—se mi bone memoras—iu el liaj figuroj rimarkas, ke nun estas ie saĝulo, kiu kreis internacian lingvon. En lia fama utopiista verko “La romano de la estonta jarcento”,—en kiu li profetas la grandajn batalojn per aerŝipoj kaj la ekziston de fortega respublika Ruslando—li priskribis detale la skribsignojn internaciajn, laŭ lia opinio ĉie uzotajn anstataŭ internacia lingvo. Strange tiutempe—ankoraŭ en la pasinta jarcento—li ne fidis en la realigo de aparta, parolebla internacia lingvo, kvankam li verkis ĉarman rakonton, en kiu ĉefan rolon ludas la tiutempe konata *Volapük*.

*Li mem sciis la tiutempajn ĉefajn klasikajn kaj eŭropajn lingvojn kaj ofte uzis el ili esprimojn en siaj verkoj.

Tiu ĉi verketo “Csalavér” (nomo de virino, laŭvorte signifas “trompa sango”), priskribas fantazian okazintaĵon ie ĉe la mongola aŭ ĉina landlimo, kie el servuta laboro en siberia subtera minejo la grupo de rusaj kaj alinaciaj ekzilitoj mirinde saviĝas, ĉar ili trovas priskribon kaŝintan pri la liberiga vojo en la “mondlingvo”. Ili transiras al najbara ŝtato, kie regas utopia maŝina epoko kaj kie oni parolas en la mondlingvo.

La amo por patrujo kaj homaro aliĝas ĉe Jókai kun la granda virto, ne disigebla de la menciitaj amoj: la naturamo. Li ne estis materialisto. Liaj kritikistoj ofte menciis, ke li estas multfoje iluziulo, eĉ mistikulo, sed liaj naturpriskriboj, sciencaj studoj instigas kaj stimulas ekami natursciencon. Liaj priskriboj pri la naturbelaĵoj estas belegaj kaj klasikaj. Kvankam li mem kelkfoje balanciĝis inter diversaj politikaj tendencoj, li ĉiam firme staris sur la fundamento de la principoj: kontraŭ homa subpremo, por la homa libereco, kontraŭ ia ajn divido kaj diferencigo inter homo kaj homo, kontraŭ la malamo ŝovinista kaj rasa, kontraŭ la militinstigo. Kaj tia nobla estas lia tuta verkaro—eĉ se kelkajn el la cent volumoj kolektitaj ankoraŭ en lia vivo li mem volis, kiel malpli-valorajn, forlasi.

Ĉion trafenetras la brila bonhumoro kaj amika, kondamna, kompata, indulga satiro kaj anekdota priskribo de Jókai. Tiu homo estas plej forta, kiu scias rideti el koro inter la grandaj bataloj kaj luktoj de la homaro, kiu ĉiam staras ĉe flanko de la bono, de la homeco, de la nobla vivo kontraŭ la malbono, senhomeco, misfaro, milito! Jókai naskiĝis en 1825 kaj mortis en 1904. Dum lia longa vivo li

estis advokato, ĵurnalisto, redaktoro, revolucia batalanto, post la malvenko de la hungara liberec-batalo de Kossuth li devis kaŝi sin ĉe diversaj bonaj amikoj antaŭ la venĝo de la Hapsburga reĝimo. Poste li denove redaktis kaj verkis, verkis . . . Tiutempe liaj tro idealaj, nerealaj naciaj kaj sociaj herooj donis konsolon, vivcelon kaj entuziasmon al la letargie vivanta hungara nacio.

Oni ne povas fini tiun ĉi priskribon ne menciinte kiel arde li amis, flegis kaj evoluigis la hungaran lingvon. Li plibeligis, pliriĉigis kaj formis ĝin, sekvante la vojon de la pli fruaj hungaraj lingvoreformistoj kaj verkistoj. Ja la hungara literatura lingvo, kiel tiom da aliaj naciaj lingvoj, ne estas tute "natura", sed artefarite, majstre kaj ame kreita el la trezoro, kion liveras de jarcentoj la parolmaniero kaj vorttrezoro kaj la animo de tuta popolo.

Ĉe lia monumento en la mezo de Budapeŝto diris je la solena festo okaze lian kvindekan mortotagon la nuntempa konata vilaĝana verkisto Péter Veres (kiu mem deklaris antaŭ kelkaj jaroj, ke li aprobas Esperanton ankaŭ kiel kunligilon por diversnaciaj vilaĝanoj) ke apud la fabela beleco, la sekreto de Jókai estas lia anima sereneco kaj la granda homamo, kio ankaŭ nun ekbatigas pli forte niajn korojn: "Jókai povis tiel entuziasmi la hungaron, ke li ne veku malamon kontraŭ aliaj nacioj. Kaj tio estas granda afero". Mi finas kun liaj finfrazoj; ĉar ili estas aktualaj por la esperantistaro, ne nur por verkistoj:

"Vi povas koni la mondon, vi povas koni la homojn, vi povas konatiĝi kun la arto de la verkado, vi povas ankaŭ ekkoni la politikan kaj socian lecionon valoran ĝuste nun aŭ por la estonteco; sed se ne estas en vi la amo por la

homa gento, al via popolo, al via nacio, se vi ne kredas en ideoj, nek en idealoj, *vi konstruas sur sablon*. Se vi amas nur vin mem, vi vivas nur, ĝis vi mem vivas. Do deklaru tion, en kio vi vere kredas. Kaj kion vi kredas, sur tion vi metu vian tutan vivon. Ankaŭ tiam se ĝi estas mallonga, ankaŭ, se ĝi estas longa."


La Eksperimento Midlothian, *fino*

lernos la francan lingvon, kaj de tempo al tempo oni mezuros ilian progreson en tiu studo, samtempe komparante la progreson de la infanoj kiuj antaŭe lernis Esperanton kun la progreso de la aliaj, kiuj ne havis tiun instruon. Tiamaniere oni eltrovos kiom da influo la antaŭlernado de Esperanto havis sur la posta lernado de la franca lingvo. En la somero de 1955 la eksperimento daŭros sur samaj linioj, sed kun alia aro de lernantoj. Dum la sekvontaj tri jaroj de la edukado de tiuj infanoj de la grupo 1955, oni kontrolos ankaŭ ilian progreson en la lernado de la franca lingvo. Pro tio, definitivaj rezultoj de la eksperimento ne estos haveblaj antaŭ la somero de 1958.

Por atingi fidindan konkludon pri la rezultoj, necesos multe da statistika laboro, kaj en tiu laboro la Edukada Komitato de Midlothian ĝuos la kunlaboradon de la Skota Konsilantaro por Esplorado en Edukado, aro da lertaj kaj spertaj edukistoj, konataj en internaciaj edukaj rondoj.

Oni devas memori ke la ĉefa celo de nia lingvo *ne* estas prepari la vojon al la lernado de aliaj lingvoj. Tamen, se la Eksperimento Midlothian pruvos poste ke la antaŭa lernado de Esperanto helpas, tio estos por ni grava rezulto, nepre uzenda en estonta informado kaj propagando.

Enigma Konkurso N-ro 91



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respond-kupono internacia.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 87-a konkurso: S-ro J. P. Beau (Franc) 126, S-ro A. G. Meana (Hisp) 123, S-ro F. M. Mulder (Ned) 122 p.

Enigmo N-ro 207: La tuto konsistas el 128 literoj kaj koncernas la enigman konkurson. 49-64-14-106-8-119-31-126-81 monato en kiu neniam konkurso; 38-114-82-53-86 ĉiu volas tion en konkurso; 68-72-127-61-28-89-54 tion ĉiuj solvantoj devus fari; 47-128-23-41-9-94-101-103-45-32-78 de la solvantoj ĝi nepre kreskos; 6-97-66-16-51-15-57 grava monato por novaj abonantoj; 77-33-99-17-42-58-25 kion mi volonte ricevos; 1-12-69-4-10-80-95-26-74-109 de tie ĉiu esperantisto esperas aŭdi bonan novaĵon; 117-73-35-75-125-43-84 lando kie verŝajne baldaŭ okazos kongreso; 19-2-11-67-120-59-96-90-4-112-126-29 titolo de konata verko de Julio Baghy; 39-41-87-110-70-37-13-122-63 la plej granda vorto en la titolo de en esperanton tradukita verko pri atom-aferoj; 7-100-123-65-17-115-40-102-93-31-113-71-92-21-88-33 titolo de libro pri tualeta mizero; 121-5-46-12-30-52-79-29 hidrarga laksigilo; 124-24-116-108-10-50-42 larmigilo; 56-18-83-44-104-118-85-54 sen vorte komprenigi al iu ke li venu; 3-37-55-52-91-34-45 rakonto pri malnovaj okazintaĵoj; 62-76-20-9-86-36-57 bongusta sudfrukto; 22-27-60-1-107-98-102-78 defendilo kiun soldatoj en

antaŭaj tempoj ne bezonis; 48-111-11-21-105-81 oni ĝin devas scii por forsendi leteron.

Enigmo N-ro 208: Ĉiu duo da difinoj prezentas du sesliterajn vortojn, kiuj havas kvin komunajn literojn. La nekomunaj literoj de ĉiu dua difino formas en la donita sinsekvo esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. 1. ordinara birdeto—loko, kie iu loĝas; 2. korpoparto—grasa substanco; 3. arbeto kies burĝonojn oni konservas en vinagro—korpoparto; 4. aldoni teritorion al regno—duonride; 5. montranta spiritan viglecon—rabisto; 6. taksita sumo—monunuo; 7. ĉeso de laboro—defenda armaĵo; 8. vojo—ekleziulo; 9. ĉarniro—oni havas ĝin pro malvarmumo; 10. grava infekta malsano—palpa organo de insektoj; 11. estanta aliflanke—diablo; 12. okulparto—sezono; 13. rusa longecunuo—movigilo; 14. spekulativa rezonado—vira voĉo; 15. amaso da objektoj—kapoparto; 16. arboparto—panoparto; 17. amuzejo en banloko;—vestoparto; 18. spongeca brulema substanco—jugoslava monunuo; 19. ripozejo—ĉambroparto sur kiu oni paŝas; 20. luktado—tago; 21. kartludo—pezunuo por diamantoj; 22. domparto—arbo- parto; 23. kolonforma turniĝanta akvomaso—maŝino.

Bonvolu bone atenti la ĉi-supran novan adreson!!



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Pri magnetofonoj

Post kiam la magnetofono estis inventata, tiu ĉi aparato penetris en multajn kampojn.

Por la radio-stacioj ĝi signifas faktan revolucion, kaj en la lernejoj ĝi rezultigis, ke porlernejaj elsendoj per radio povas esti konservataj, ĝis kiam ili nature konvenas en la instruadon de la klasoj. Krome la magnetofono ekaplikiĝis ĉe tribunaloj, ĉe kunvenoj de urbestroj kaj en multaj aliaj rilatoj. Ankaŭ al la esperantistaro la magnetofono povas bonege profiti.

Eble vi tuj pensas pri la alvoko de la roma radio, kiu petis al esperantistaj posedantoj de magnetofono sendi enparolon al la radiostacio por elsendo.

Jes, prave, jen la unua pruvo !

Sed plie oni ne rajtas forgesi la korespondadon. Ni Esperantistoj ja estas energiaj letterskribantoj. Per papero kaj plumo ni ligas rilatojn tra la tuta mondo. Kia avantaĝo, ke ni nun havas eblecojn ligi la rilatojn per voĉo ! Tio estas progreso !

Menciinde estas, ekzemple, ke magnetofona bobeno povas enhavi pli da vortoj ol eĉ longega plumletero. Plie la voĉo estas pli persona ol literoj, kaj, ne forgesinde, per la magnetofono ni havas pli bonajn eblecojn konatiĝi kun la lando de la korespondanto. Malgrandaj sonbildoj pri birdvoĉoj, infana ludado en la strato, la vigla trafiko de granda ĉefurbo estas nur kelkaj ekzemploj pri la vere rimark-

indaj perspektivoj, kiuj prezentas sin.

Ĉu vi dubas, ke per magnetofonoj estas eble vigligi mortantan kluban vivon ? Unu vesperon oni streĉe aŭskultas, alian vesperon oni preparas interesan programon por la korespondantoj, kaj trian vesperon oni faras la enparolon.

Jen mi prezentos al interesemuloj planon : Unue mi petas al ĉiuj posedantoj de magnetofono skribi al mi (al ĉiuj, kaj al tiuj, kiuj havas dratan aparaton, kaj al rubandaparataj posedantoj). Skribu antaŭ la 15a de decembro, ĉar tiam mi kolektos ĉiujn alvenintajn adresojn kaj multobligos ilin forme de listo.

Io plia : certe estas diversaj aferoj, pri kiuj vi speciale interesiĝas. Menciuj ĉiujn viajn ŝatokupojn kaj ne forgesu vian fakon ! En la listo estos aldonata al via nomo tiuj aferoj, pri kiuj vi ŝatus interŝanĝi parolatajn leterojn, kaj krome, ĉu via aparato estas rubanda aŭ drata.

La listo estos sendata al ĉiuj alskribintoj, kaj laŭ la informoj donitaj en rilato al la korespondemuloj ĉiu facile povos konstati, kun kiu li ŝatus interparoli. Nebezonte diri, ke ju pli da personoj anoncis sin, des pli efika estos la afero.

Mi mem dum unu jaro praktikigis la parolan korespondmanieron, kaj ververe ĝi estas rekomendinda. Skribaj ekzercaj eblecoj ne mankas al ni esperantistoj. La korespondado per leteroj jam longe pruvis sin

bonega helpilo tiurilate. Sed buŝaj eblecoj!!—efektive mankas al la plimulto el ni parolekzerco, kaj jen la okazo mankinta!

Ĉar la projekto prezentas kelkajn elspezojn, mi nur petas al ĉiuj anoncontoj ĉemeti unu internacian respondkuponon. Diverslande tio eble donos malfacilaĵojn, sed kvankam ĉemeto de kupono eventuale estas neebila al vi, ne tial ne anoncu vin! Do, magnetofonhavanto, ne hezitu! Skribu al: Ole Nederland, C.A., Oksbøl, Danlando.

Unua Libro

Por pli granda korekteco de la Historio de Esperanto estus bone ke vi informu la esperantistojn ke la rusa broŝuro de D-ro Esperanto estis presita vere en du eldonoj (almenaŭ du) kaj ke la faksimile represita eldono estas tiu de la dua.

Mi havas ekzempleron originalan de ambaŭ eldonoj kaj komparis ilin kaj notis, ke en la unua eldono ne estas preseraroj en la Esperanta teksto kaj ke la rusa teksto estas pli mallonga ol ĝi estas en la dua eldono. Ambaŭ broŝuroj estis datumitaj 1887 sed tio ne signifas, ke la dua eldono ne estis presita unu aŭ du jarojn poste sed datumita same kiel la unua eldono pro oportuneco rilate la cenzuron. Pri mia unua eldono mi havas tamen neniujn dubojn pro diversaj kialoj.

Kio estas tre grava en tiu detalo estas, ke se ĝi ne estas diskonigita, la estonto kulpigos nian Majstron je senzorgeco rilate la preserarojn en lia unua broŝuro, kiel ekz. "Ĉu mi ne vinkos en decida hor' ". Tiu eraro ne estas en lia unua eldono sed montriĝas en la dua, same kiel en kelkaj alilingvaj broŝuroj, sendube pro tio ke li tro fidis je sia presisto, aŭ ne plu havis tempon tralegi la presprovaĵojn.

Mi tre atente ekzamenis la unuan eldonon, kaj eĉ ne povis trovi ke mankas unu komo. Pri la rusa teksto mi bedaŭrinde ne povis juĝi, sed mi havas tutan fidon ke li ankaŭ tre atente korektis ĝin por ke ĝi estu senerara. En la dua eldono mi trovis tri erarojn en la esperanta teksto, ne parolante pri la vortaro.

Ch. Chomette, Usono.

Elparolado

Ĉeestinte mian unuan Universalan Kongreson, min frapis forte la granda diferenco inter la diversaj parolantoj rilate al komprenebleco. Mi zorge atentis ĉe la kongreso la trajtojn kiuj distingis la plej klarajn parolantojn kaj la plej malklarajn, kaj miaj konstataĵoj, montrante laŭŝajne malofte menciatajn aferojn, eble interesos tiujn kiuj celas plej eble klare paroli.

Sendube la plej grava artero estas intonacio: la regado de la voĉtono dum la vortofluo. Ĉiuj facile kompreneblaj parolantoj forte apartigas la akcentendajn silabojn. Aŭskultinte, per ne malspertaj oreloj, unu-du parolantojn (mi ne menciis nomojn) kiuj povis sin komprenigi eĉ dum rapidega vortĵetado, mi konstatis ke oni kaj plilaŭtigu la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto, kaj levu la voĉtonon ĉe ĉiu radikfina silabo; krom tio, estas malbone ŝanĝi la voĉtonon dum iu frazo. Ĉi tiu speco de voĉtonado estas evidente malfacila por iaj lingvanoj, en kies lingvoj gepatraj la regulo postulas laŭfrazan kaj ne laŭsilaban voĉtonadon; ekzemple, la francoj. Skandinavoj, angloj, kaj kelkaj germanoj multe pli sukcesas tiurilate. Plue, estas multe pli klare montri la komojn, punktojn, k.t.p. per paŭzetoj, ol per ŝanĝi la voĉtonon. Emfazon montri nek per ekbleko nek

per plialtigo de la voĉo, sed per pli malrapida parolo de la emfazata vorto ; estas aparte konsilinde ankaŭ meti paŭzetojn antaŭ kaj post ĉiu neatendota aŭ malofta vorto, pleje ĉe nacilingvaj propraj nomoj, se ne tre bone konataj.

Neatendite, mi konstatis ke malĝustaj sonoj ne tre malhelpis komprenon ; la “-oŭ” de la angloj kaj la “set” de la germanoj kaj nederlandanoj estas ĝenaj kaj malbelaj, sed malofte konfuzaj. Nur la elparolado de fina -e kiel -a, kaj la uvola “r”, kiujn faras germanoj la unuan kaj francoj la duan, estas malklarigaj.

Mi iom miras, ke en neniuj lernolibroj kiujn mi konas oni donas iajn regulojn pri voĉtonado ; ĉu oni povas esperi ke la Akademio iam atentu tiun ne malgravan aferon ?

F. Parker-Rhodes, Britujo.

Konferenco de UNESKO : *fino.*

Hotel Cervantes, Soriano 868, Montevideo, Urugvajo. Liafable petas, ke oni ne skribu al li je tiu adreso krom rilate nian aferon antaŭ UNESKO. Inter la 1-a de Oktobro kaj la fino de Januaro 1955 CED okupiĝos ekskluzive pri la demando de la Internacia Lingvo antaŭ UNESKO kaj tial estas konsilinde provizore ne skribi pri aliaj aferoj.

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 31an de Majo ..	37	19	9
G. R. Aitchison, Anglujo ..	1	0	0
F. W. Shaw, Anglujo ..		9	0
J. Brownlee, Anglujo ..		3	0
J. Régulo, Kanarioj I. ..	1	0	0
A. Wesser, Usono ..		7	0
Fed. de Islandaj Esp. ..	10	0	0
E. Neiger, Italujo ..		11	5
Sumo la 31an de Aŭg. ..	£51	10	2

Al ĉiuj donacintoj koran dankon.

Internacia Konkurso 1954

Stato je la 31a de aŭgusto

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	2770	138.5
2.	Kanado ..	250	345	138.0
3.	Sudaŝriko ..	300	395	131.6
4.	Maroko ..	700	805	115.0
5.	Germanujo ..	3600	4110	114.2
6.	Urugvajo ..	250	280	112.0
7.	Svislando ..	1500	1655	110.3
8.	Nederlando ..	4600	5055	109.9
9.	Danlando ..	2500	2725	109.0
10.	Italujo ..	2900	3150	108.6
11.	Jugoslavujo ..	1600	1736	108.5
12.	Svedujo ..	5900	6200	105.0
13.	Portugalujo ..	500	515	103.0
14.	Hispanujo ..	1600	1620	101.3
15.	Japanujo ..	900	905	100.6
16.	Francujo ..	5600	5517	98.4
17.	Aŭstrujo ..	850	830	97.6
18.	Usono ..	2300	2239	97.3
19.	Islando ..	350	335	95.7
20.	Britujo ..	9500	8761	92.2
21.	Aŭstralio ..	1000	890	89.0
22.	Kubo ..	250	220	88.0
23.	Belgujo ..	2300	1970	85.7
24.	Novzelando ..	850	726	85.4
25.	Izraelo ..	250	210	84.0
26.	Irlando ..	250	185	74.0
27.	Venezuelo ..	250	165	66.0
28.	Norvegujo ..	2300	1515	65.8
29.	Argentino ..	950	605	63.7
30.	Brazilo ..	6400	3965	61.9

Belartaj Konkursoj : *fino.*

La premiitaj verkoj apartenas al la jenaj landoj : Anglujo 2, Belgujo 1, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 3, Francujo 2, Nederlando 1 kaj Svedlando 1.

Al la premiado kontribuis anonimulo por la prozo originala per valoro de 30 usonaj dolaroj ; LKK Haarlem per 100 ned. guld. ; Sveda Esp.-Federacio per 75 sv. kronoj ; kaj Brita Esp.-Asocio per £5.

Al la konkursantoj, komisionanoj, kaj donacintoj, sincerajn dankojn pro la granda interesiĝo !

D-ro F. Szilágyi, Sekretario.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 264

7an de Septembro 1954

Generala voĉdonado. Ĝenerala voĉdonado rilate al proponita nova Statuto nun okazas. En la lasta semajno voĉdoniloj estas senditaj al la Aliĝintaj Landaj Asocioj kaj al la Individuaj Membroj en landoj sen Aliĝinta Landa Asocio. La lasta tago por ricevo de plenigitaj voĉdoniloj estas 30 Novembro 1954.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aŭgusto kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	5587	7635
Individuaj membroj :		
MJ 870		968
MA 3815		3868
MS 596		725
Patronoj .. 6		7
DM 260		274
HM 58		59
	5605	5901
	11192	13536

DELEGITOJ

Britujo

East Molesey. D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Pardubice. D : O. Hrubeš, Stalingradské náměstí 55.

Germanujo

Bodenheim. D : vakas.

Hannover. D kaj FD (Inĝenieraj aferoj) : vakas.

Oldenburg. D : F. Janssen, Sachsenstr. 92. Tel : 2110 (deĵore).

FD (Bibliotekoj) : La D.

Weseke (Krs. Borken). D : H. Otterpohl, Ringstrasse 13. Tel : 571.

Wiedenbrück i.W. D : H. Daum, Kolpingstrasse 15. Tel : 367.

Usono

Milwaukee (Wisconsin). VD : J. E. Bush, 3700 North 75th. St., Milwaukee 16. Tel : CUster 3-2323.

FD (Instruado) : La VD.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Bonnet, F-ino C. L., Driebergen, Nederlando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

725. Taylor, S-ro F. V., Albury, Aŭstralio

726. Thollet, S-ino O., Port Lyautey, Maroko

727. Thollet, S-ro M., Aix-en-Provence, Francujo

728. de Jager, F-ino A. J. M., Bandung, Indonezio

729. Miguens, S-ro F., Nilopolis, Brazilo

730. Burger, S-ro P. R., Lajes, Brazilo

731. Santiago, S-ro O., Sao Paulo, Brazilo

732. Silva, S-ro M. M. F., Rio de Janeiro, Brazilo

733. Rasmussen, S-ino N., Aarhus. Danlando

DONACO al la Ĝenerala Kaso : S-ino J. S. Ryan 10ŝ.

DONACOJ al la Fondajo Montevideo : Mondcivitanoj de Rimini 7ŝ., Londona Esp.-Klubo £10, Asocio de Esp. en Pollando 92ŝ., S-ro Laffon 20ŝ., F-ino M. Vermaas £18 15ŝ., Sveda Esp. Fed. £6 17ŝ. 9p., per Itala Esp. Fed. £3 9ŝ. 8p., Gent-samideanoj 15ŝ. 2p., Kolektita de Hispana Esp. Fed. £9 6ŝ. 0p., Graz Esp. Gr., 15ŝ., U. Polenta 5ŝ. 8p., R. T. Vineski 21ŝ.

Sumo ĝis 31-8-1954 : £1,066 8ŝ. 0p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Kubo

La ĉefaj filatelaj organizaĵoj de Kubo kuniĝis por festi la unuan centjaron de la Kuba Poŝtmarko per *Internacia Filatela Ekspozicio* okazonta dum Aprilo 1955. Oni invitis Kuban Esperanto-Asocion, ke ĝi estu reprezentata en la Organiza Komitato. Cirkuleron en Esperanto oni eldonos tuj kiam la O.K. aprobos plenajn detalojn pri la ekspozicio.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj Vi, ho mia Sinjoro, havas favor-korecon; Ĉar Vi redonas al homo laŭ liaj faroj.
Ps. 62.12.

Em. Swedenborg, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la novan lumon pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn senpage vi ricevos, se eble kontraŭ 1 resp. kup., ĉe: Jan B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakio.

Novzelandano deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Adreso: Harding Brown, 7 Scarborough Road, Sumner S.E.3, CANTERBURY, Novzelando.

Kansai-Ligo de Esp.-Grupoj serĉas korespondantojn ĉiuagajn, ĉiuprofesiajn pri ĉia temo por siaj anoj. Respondo garantiata, Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodo-ku, OSAKA, Japanujo.

Interĝanŝon de poŝtmarkoj deziras: "Filatelo", 142 Clarendon Street, EAST MELBOURNE, Vic., Aŭstralio.

Esperantaĵoj (libroj, gazetoj k.a.). Mi vendas parton de mia kolekto trokreskinta. Seriozaj interesatoj skribu al Lippmann, 1021 East 14th Street, BROOKLYN 30, N.Y., Usono.

S-ro Augustín J. Palacios, E.S. Zeballos 20, ROSARIO, Argentino, deziras ricevi ĉiuspecajn Esperanto-glumarkojn, en bona stato. Rekompencos per argentinaj neuzitaj poŝtmarkoj.

Frank MacDonald (S-ro), malsanulo en hospitalo, deziras korespondi tutmonde. Morningfield Hospital, Kings Gate, ABERDEEN, Skotlando.

S-ro Sherman Schochet, P.O. Box 91, JAMAICA 31, N.Y., Usono. 30-jara deziras korespondi kaj interŝanĝi PM, unua-tagajn kovertojn kun la tuta mondo. Respondo garantiata.

Junulo, Peter Manhardt, Ottenhof 204, LOHR/M, Germanujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Eŭropo kaj Afriko.

Zorgistino bezonata pri 10 junaj knaboj en sendependa lernejo; samideanino preferinda. Lokoj restas ankoraŭ por internuloj el eksterlando. Vidu jarlibron (unuan

parton), pp. 45 kaj 126. Lernejestro, Nikune, Langley Grange, Ifield, CRAWLEY, Sussex, Anglujo.

Filatelistoj. Mi regule sendos al vi la plej novan serion da poŝtmarkoj, post ricevo el via lando de la plej lasta serio, gluita sur koverton. K. v.d. Wolf, Trompenburgstraat 105-I, AMSTERDAM-Z, Nederlando.

Nova samideano deziras korespondi kun geamikoj en la tuta mondo. Josef Petrovsky, Náprstkova 3/I, PRAHA I, Ĉeĥoslovakujo.

Redaktoro de kortbirda gazeto deziras interŝanĝi presaĵojn pri Kortbirda Kultivo kaj korespondi. La adreso: Shosaku Isobe, c/o Keiyu-sha, Minami-Kajiya-chō 1-2, Naka-ku, NAGOYA, Japanujo.

La infanĝardeno de la Ludĉambro ĉe Kopenhago serĉas kiel kunlaborantinon junulinon, kiu flue parolas Esperanton, vegetarano kaj nefumanto preferata. Salajro laŭ kvalifiko. Oni turnu sin al Karen Bjørnsby, Hartmannsvej 23, HELLERUP, Danlando.

La infanoj de la Ludĉambro interŝanĝas pupojn, abocojn, kantetojn, ludilojn kaj desegnaĵojn kun la tuta mondo. Karel Bjørnsby, Ludoĉambro, Hartmannsvej 23, HELLERUP, Danlando. Represo permesata.

Diversaĝaj geklubanoj deziras korespondi. Skribu tuj multnombre al letervespero okazonta la 16-an de Decembro 1954. Klubo Esperantista, Björkvägen 7, SKÖVDE, Svedujo.

Intersteno. La sola internacia alfabeto—stenografia—facila—kun adeptoj en ne malpli ol 19 landoj—deponejoj en multaj lokoj—havebla materialo (lerniloj) precipe ĉe C. Daglio, Litta-Parodi, ALESSANDRIA, Italujo. (Aldonu pagon).

Esperanta grupo en Ostrava aranĝas por siaj kursanoj la 8-an de Decembro 1954 letervesperon. Skribu al Zdeněk Škvrna, Dvorskova 7, OSTRAVA I, Ĉeĥoslovakujo.

Kapitano deziras korespondi kun studentinoj en ĉiuj landoj: Raverdel, SAINT-HILAIRE (Lot-et-Garonne), Francujo.

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ

de D-ro PAUL NEERGAARD

*licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj
sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago; krome, membro de
la Akademio de Esperanto*

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, 9 paĝojn da bildoj en
koloroj kaj proks. 80 aliajn bildojn

Belege bindita, prezo £1, aŭfranko 9p.

Interesa libro por ĉiu, kaj aparte utila por ĉiu ĝardenamanto,
ĝardenisto, kaj la propagandisto

Resume: Verko tre utila, kapabla altgrade levi la reputacion
de Esperanto, kaj do ĉiel rekomendinda.

Heroldo de Esperanto

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la
duonon de "Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj".

Prof. Hugh Nicol en "Esperanto"

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj
seneraran faklibron . . . Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli
moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.

Carl A. Klang en "Svenska Esperanto Tidningen"

Nova trezoro de nia literaturo, libro impona laŭ aspekto kaj laŭ
enhavo.

La Revuo Orienta

Konklude: ĉi tiu libro estas elstara gajno por nia fakliteraturo
kaj oni miras pri la relative malalta prezo por tia belaspekta kaj riĉe
ilustrita verko.

G. F. Makkink en "Svisa Espero"

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Rickmansworth, Anglujo

aŭ ĉe enlanda libroservo